Szegzárd, en aŭgusto 1901.

Estimata Samideano!

En la pasinta jaro 1900 Vi abonis nian gazeton, kaj, kaŭze de tiu ĉi abono, mi sendis ĝin al Vi ĉiam, ĝis nun. Mi kredis kaj kredas, ke Vi ankaŭ en la kuranta jaro 1901 restas fidela al Esperanto; sed Vi ĝis nun forgesis reaboni nian gazeton por 1901.

Ĉar la ekzistado de la gazeto „Lingvo Internacia“ dependas sole de la regula ricevo de l' abonmonoj, mi kuraĝas Vin peti: volu havi la bonecon, ensendi al mi kiel eble plej baldaŭ la abonmonon.

Se Vi, estimata Samideano, pro ia ajn kaŭzo, ne povas *nun* ensendi la monon, volu min sciigi pri via abonvolo sur la tie ĉi metita poŝtkarto.

Kun saluto internacia

Paul de Lengyel.

P. s. — Vi ŝuldas ankaŭ la abonmonon por la jaro 1900; volu, mi petas, ankaŭ tion ĉi ensendi.

LEVELEZŐ-LAP.

Carte postale. — Poŝtkarto.

Egyetemes posta-egyesület. Magyarország.

Union postale universelle. Hongrie. — Poŝta ligo universala. Hungarujo.

VÁLASZ. — Réponse. — Respondo.

LENGYEL PÁL úrnak

(Hongrie.)

SZEGZÁRD.

Avizo.

La gazeton „Lingvo Internacia“ oni povas aboni ĉe la sekvantaj sinjoroj:

En Rusujo:

Dr. L. Zamenhof, ul. Dzika N° 9, en **Varsovio.**

En Francujo:

René Lemaire, sekretario de la S. p. p. Esperanto, en **Epernay** (Marne).

En Finlando:

Aug. Th. Laurén, apotekisto, en **Jyväskylä.**

Alilandanoj devas sendi la abonmonon per poŝta mandato direkte al la

ADMINISTRACIO DE LA „**LINGVO INTERNACIA**“

Paul de Lengyel, en Szegzárd, (Hungarujo, **Hongrie**).